Heinrich Heine,

# Die schlesischen Weber

Im düstern Auge keine Träne
Sie sitzen am Webstuhl und fletschen die Zähne:
Deutschland, wir weben dein Leichentuch,
Wir weben hinein den dreifachen Fluch -
Wir weben, wir weben!

Ein Fluch dem Gotte, zu dem wir gebeten
In Winterskälte und Hungersnöten;
Wir haben vergebens gehofft und geharrt,
Er hat uns geäfft, gefoppt und genarrt -
Wir weben, wir weben!

Ein Fluch dem König, dem König der Reichen,
Den unser Elend nicht konnte erweichen,
Der den letzten Groschen von uns erpreßt
Und uns wie Hunde erschiessen läßt -
Wir weben, wir weben!

Ein Fluch dem falschen Vaterlande,
Wo nur gedeihen Schmach und Schande,
Wo jede Blume früh geknickt,
Wo Fäulnis und Moder den Wurm erquickt -
Wir weben, wir weben!

...

Heinrich Heine,

# La ruĝaj teksistoj

*tradukita de Emil Pfeffer*

En senlarma okul' kaŝante la sentojn,
Ili sidas kaj teksas kaj grincas la dentojn:
Malnova mond'! Ni teksas en pen'
Morttukon al vi kun triobla malben' -
Ni teksas, ni teksas!

Malben' al diaĵo, al kiu kun preĝo
Turniĝis en frosto, malsato kaj neĝo
Ni kaj atendadis en vana esper' ...
Ĝi mokis kaj ridis je nia mizer' -
Ni teksas, ni teksas!

Malben' al la reĝo, la reĝo de riĉaj,
Senkora vampiro por ni malfeliĉaj,
Senigis li nin de la lasta mon',
Nun oni nin pafas laŭ lia ordon' -
Ni teksas, ni teksas!

Malben' al falsa la patrolando,
Kie regas tiaj vampiroj en bando,
Elsuĉas vivsukojn el ĉiu jun-flor',
Protekt' nur por vermoj, putraĵ', malhonor' -
Ni teksas, ni teksas!

...

Das Schiffchen fliegt, der Webstuhl kracht,
Wir weben emsig Tag und Nacht -
Altdeutschland, wir weben dein Leichentuch,
Wir weben hinein den dreifachen Fluch,
Wir weben, wir weben!

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17), publikigita 1846.*

*Arg-240-479 (2004-06-02 11:33:30)*

*Ursprünglicher deutschsprachiger Text der zweiten Fassung des Gedichtes, die im Jahr 1846 von H. Püttmann in der Gedichtsammlung „Album. Originalpoesien“ – mit dem Vermerk „vom Dichter revidirt“ - herausgegeben worden ist. [Laut Netznachricht vom 27.05.04 des Heinrich-Heine-Instituts Düsseldorf, Frau Marianne Tilch.]*

Kaj krakas teksilo kaj flugas ŝipet’,
Ni teksas sen ĉes’, kun la mort’ pro l’ vet’ ...
Malnova mond’! Ni teksas en pen’
Morttukon al vi kun triobla malben’ -
Ni teksas, ni teksas!

*Traduko de la Germana poemo “Die schlesischen Weber” de* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* EMIL PFEFFER *(∗1891-12-16 – †1965-11-20) en 1929.*

*Arg-240-481 (2004-05-24 22:44:39)*

*La traduko de Emil Pfeffer aperis en la sveda revuo “Svenska Arbetar-Esperantisten” (= “La sveda laborista Esperantisto”, en la septembra-oktobra numero de 1929, sur paĝo 83. Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiujn informojn kaj la tradukon de Emil Pfeffer en la libro “Verkoj de Heinrich Heine” de Adolf Holzhaus, eldonita en 1973 de la “Esperanto-Ligo en Israelo”.*